

Informilo #3




La lastaj antaŭIJK-aj informoj

Por tiuj, kiuj ŝatus atingi IJK-egon memstare de la fervoja stacidomo

La plej bona varianto:

De metrostacio “Vokzalna” (“Stacidoma”) veturu unu distancon ĝis “Universitet” per buseto 548 (ĝia starta haltejo estas dudek metroj maldekstren de la eliro) kaj veturu ĝis la haltejo “Metrolohična” (ĉ.35-40 min), de ĝi revenu ĉ.40 m, turnu maldekstren kaj iru, sekvante la montrilojn.



GRAVE

1. Estu atenta pri la [deklar-enketo](#), plenigita ĉelime - la restintan duonon bonvolu konservi por ne havi problemojn ĉe forlaso de la lando.
2. Vi nepre devas havi [medicinan asekuron](#) - por ajna okazo...
3. Ankoraŭfoje pri ukraniaj [SIM-kartoj](#). La ĉefa celo - esti konstante en kontakto kun la kongresanoj kaj senpagaj paroloj en la reto. Mendu...
4. En la sesa “Sporta” tago de la kongresa programo estas ero - [futbalmatĉo](#) de esperantistoj kontraŭ kijivaj ĵurnalistoj (eble artistoj) aŭ - selektita ukrain-pola teamo (kiel gastigantoj de la Futbal-ĉampionato 2012) kontraŭ la tuta mondo... Knaboj kaj knabinoj, anoncu vin!
5. Por tiuj, kiu sukcesos atingi la bazejon 14.07 antaŭ la solena malfermo, estas eblo tagmanĝi en la restoracio kontraŭ aparta pago 3 eŭroj. Dezirantoj bv anonci vin, por ke ni mendu la konvenan kvanton.

Por tiuj, kiuj ŝatus atingi IJK-ejon memstare de la flughaveno “Ĵuljani”

Ĝi estas en la urbo. Per la buseto # 496, kies haltejo estas proksime al la haveno, veturu ĝis la haltejo “Restoracio “Budmo!” (proks. 15 min), poste sekvu la skemon, atentante la montrilojn:



Por tiuj, kiuj volus atingi IJK-ejon memstare de la flughaveno “Borispol”

Ni rekomendas tion ne fari - komplikas la vojo. Ŝparu viajn nervojn kaj avertu nin pri la veno - vi estos renkontita (kiam vi registriĝos, al via kotizo estos aldonitaj 6 eŭroj - vojelspezo de la renkontanto). Certe vi povas preni taksion, kiu veturigos vin al la loko, sed tio kostos minimume 50 eŭrojn... Elektu mem... **Tamen por la aventuremuloj:** elirinte el la haveno, venu al granda buso kaj demandu ukrainlingve la ŝoforon: “Vokzal?” (“Stacidomo?”). Se li diros “Da” (“Jes”), eniru, pagu ĉ. 30 hrivnojn. Veninte al la stacidomo, iru antaŭen 20-25 m ĝis subtera pasejo, trairinte kiun vi trafas al metrostacio “Vokzalna” (“Stacidoma”). Poste legu la unuan rekomendon (“Por tiuj, kiuj ŝatus atingi IJK-ejon memstare de la fervoja stacidomo”).

UTILAJ INFORMOJ KAJ ANONCOJ

1. Vi povas elekti la manĝojn: matenmanĝo kaj vespermanĝo por tuta periodo - po 20 eŭroj por tuta periodo, la tagmanĝoj - po 25 eŭroj.
2. Vetero-prognozo por IJK-periodo. Estos tre varme - proks. +35!
Rekomendo! Pensu pri sekureco de viaj kapoj do, kunprenu por ili iujn ŝirmilojn.
3. **Kosto de la urba trafiko.** Metroo - 2 hrn, trolebusoj, tramoj, busoj -1,5 hrn, flavaj itineraĵ busetoj: de 2 ĝis 3,50 hrn.

4. **Aktualaj kurzoj:** en la monŝanĝejoj (ili abundas) estas 1 € = 11,2-11,3 UAH, 10 RUB = 2,8-2,9 UAH, 1 \$ = 7,95 UAH, sed ili povos ŝanĝiĝi pluse aŭ minuse. Monŝanĝejoj abundas ĉie.
5. Por la unua tago estas planata “Ronda tablo” - renkontiĝo kun ĵurnalistoj. Estas peto al reprezentantoj de ĉiuj landoj - bonvolu kunhavi flagetojn de la propraj landoj - tio povas forte impresi la ĵurnalistojn.
6. Apud la bazejo estas luejo de bicikloj (100 hrn diurne) - la dezirantoj povos uzi tiun servon.
7. Eble vi havos deziron havigi por vi **T-ĉemizon** kun emblemo de IJK-67 - mendu (ijk-67@ukr.net) anticipe kun indiko de la dimensio. Ĝia kosto estos 10 eŭroj.
8. **Por kantemula rondeto** estos eldonita IJK-kantareto, en kiu vi trovos bone konatajn ĉarmajn kaj tute nekonatajn, sed ne malpli ĉarmajn kantojn, entute estas 33 kantoj. La kosto - 1 eŭro aŭ 10 hrn (vizitu la Libroservon).
9. **Libroservo.** Alportu la vendeblaĵojn (se vi mem okupiĝos pri la vendado la prezo estas via, se vi komisias tion al Libroservo - ĝia interezo estos 5%).
10. **Lingvofestivalo.** Dum la kvina tago de IJK, la 18-an de julio, estas planata granda lingvo-festivalo.



Ĉiu povas iĝi prezentanto de sia lingvo. Bonvolu informi nin, ke vi volas rakonti pri via lingvo aŭ pri ia lingvistika afero (dum 40 minutoj). Legu pli ĉi tie:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Lingva_Festivalo.

Kunportu fotojn, librojn (speciale multkolorajn ABC-libretojn por infanoj), video-KD-ojn pri tradicioj de via popolo (estas eblo uzi komputilojn kaj projektilojn), naciajn muzikilojn, pupojn en nacia vestaĵo ktp - krom Lingvofestivalo ili taŭgos ankaŭ por Internacia Foiro (15.07).

Tio estas grandega ebleco aŭdi pri lingvoj kaj aferoj el la tuta mondo, rakonti al viaj amikoj kaj aŭdi ilin. Kune ni povas fari neimageblan feston! Ni penos doni vastan informon pri la evento.

AGRABLAĴOJ

Por vi koncertos bone konataj kaj ne tre nekonataj:

Paŭlo Moĵajev kaj krimea bardo Paŭlo Grebenjuk, Ĵomart kaj Nataŝa, Martin Wiese, JoMo, ensemble “Espero el Ukrainio” (Oksana Mirgorodska, Natalja Ivanova, Mikaelo Lineckij), dueto “ĴELE” (Elena kaj Ĵenja Wilke), pola teatra grupo, Sergeo Straŝnenko, Mikaelo Bronŝtejn, Helena Melnikova, Arsen Sepiĥanov k.a.

Vin atendas:

diversnivelaj kursoj, multaj intereseĝaj prelegoj, rakontoj, psikologiaj trejnadoj, diskutrondoj, intelektaj ludoj, ekskursoj - verŝajne por dormo mankos tempo...

Sed vi ja venos ne por la dormado, ĉu?;-)

Aludo:

**Estus tre bone, ke vi ĉiuvesper-nokte al la 00.00 venu
al la Anonctabuloj kaj konatiĝu kun la programo
por la sekva tago por ne preterdormi
ion gravan kaj interesan!!!**

Programo de la unua tago:

Tempo	Aranĝo
Ekde la 8.00	Veno, registrado, enloĝigo. Por partoprenantoj de renkontiĝo kun ĵurnalistoj (po 1 de ĉiu lando)
13.15 - 14.00	Tagmanĝo en "Budmo" (aparte pagota)
14.00 - 15.00	Veturo por renkontiĝo kun ĵurnalistoj
15.00 - 16.00	"Ronda tablo" - renkontiĝo kun ĵurnalistoj Por la restintaj kongresanoj
14.15 - 15.00	Tagmanĝo en "Budmo" (aparte pagota)
15.00 - 16.00	Veturo al solena malfermo
16.00 - 18.00	Solena malfermo kun bonveniga koncerto
18.00 -- 19.00	Reveno al la bazejo
19.30 - 20.15	Vespermanĝo
20.30 - 21.30	I-a bloko - Interkona vespero
21.30 -- 22.00	te-kaf-ktp-paŭzo
22.00 -- 23.00	II-a bloko - koncerto de Paŭlo Moĵajev
23.00 -- 08.00	Nokta programo, gufujo, bufedo, diskejo, kinejo, por la bonŝanculoj - dormeto...